

estis iu vapitio (t.e. nordamerika specio de *Cervus*), kiu vivis sur iu farmbieno en Kanada Saskaĉevanio.

Ĉe cervoj evidentis la simptomoj de cerbaj lezoj similaj al BSE de malsanaj bovoj, aŭ de skrapimalsanaj ŝafoj ("skrapio" de ŝafoj estas ekvivalenta malsano al la Krojcevdjakoba malsano ĉe homoj - ambaŭ suspektataj kiel bova BSE). Ĉe 12 cervoj, sciencistoj malkovris proteinpartiklojn kiuj estis simi-laj al tiuj trovitaj en la cerbo de malsanaj ŝafoj. La tielnomataj "prionoj" estas suspektaj kiel kaŭzo de la cerbomalsanoj ĉe bovoj kaj ŝafoj. "En ne-niu kazo oni povas klarigi la originon de la infektiĝo", komentas *Francois MOUTOU* de la Nacia Centro pri Veterinarmedicino. "Eble sovaĝaj bestoj pastiĝis proksime ĉe ŝafgregoj. Sed tio ja okazas multaloke - sen iu ajn malsanoekesto". En Usono ĉirkaŭ tri milionoj da cervoj estas ĉiujare ĉasataj kaj manĝataj.

Forcejo "Tropikoj"¹⁰

Aerpolucio pro incendioj estas grandaskale subtaksata

Fajro en la savano, perbruliga senradikigo en pluvbaroj kaj la forbruligo de agrikulturaj defalaĵoj poluciadas la atmosferon pli, ol polucias la tuta aŭtomobilistaro en la industrilandoj. Tiun opinion prezentis la nobel-premiito pri ĥemio *Paul Crutzen* de la Majenca Maksplank-Instituto (Germanujo) antaŭnelonge en Bruselo, dum konferenco pri klimato kaj ozono. Precipe dum sekaj monatoj la karbonmonoksida eligo estas pli granda en la suda ol en la norda hemisfero. Pro forbrulado de tiom da biomaso, en ĉiu jaro inter 1,8 kaj 4,7 miliardoj da tunoj de karbono estas forblovitaj en la aeron. Pro tio, malutilaj kaj nocaj ĥemiaĵoj kiel metano kaj karbondioksido atingas en grandaj kvantoj la atmosferon.

La surteraj ozonaj valoroj en kampara Brazilio aŭ Afriko estas dum aŭgusto ĝis oktobro multe pli alta ol en Eŭropaj ĉefurboj. Pro la kreskanta industriigo de multaj evolulandoj, la monda klimato decide ŝanĝigas la atmosferohemion, kio precipe okazas en la suda hemisfero - tial en tiun regionon oni estonte devos investi pli grandan parton de poresplorajlspezoj.

Cerba harmonio¹¹

Infanoj, kiuj multe muzikas dum la lerneja tempo, kapablas pli rapide lerni

Ofta muzikinstruado en lernejo plibonigas precipe la lingvajn kapablojn de lernantoj. Tiu konkludo rezultas el kompara studo ĉe 1200 Svisaj lernejoj infanoj, inter 7 kaj 15 jarojn aĝaj. Dum la daŭro de tri jaroj 35 el 70 lernejojklasoj ricevis kvin horojn da muzikinstruado ĉiusemajne; reduktinte samtempe la nombron de matematiko kaj de Germanlingvaj instruoj. La aliaj 35 klasoj ricevis nur du horojn da muzikinstruo. Post tri jaroj, psiko-

logoj komparis la kvocionton de inteligenteco, la lingvan talenton kaj la kapablon por socia integriĝo. La surpriza rezulto: infanoj, kiuj pli ofte partoprenis al muzikinstruado povis pli facile rerakonti voĉlegitajn tekstojn aŭ figure pre-zenti ilin kiel bildstria rakonto. Tiuj infanoj ankaŭ kapablis legi pli rapide ol la aliaj. Aliflanke, tiuj knaboj kaj knabinoj ne pli malbone ol iliaj gekama-radoj sukcesis en matematiko, malgraŭ la reduktita nombro de instruoj. Plua observo de la instruistoj: en la pli ofte muzikantaj klasoj la obstinaj kaj ribelemaj lernejoj "sin kondukis pli ĝentile" kaj estis malpli ofte "brulstampitaj kiel apartemulaj nigraj ŝafoj".

Perova specioprotektado¹²

Gen-testo malkovras kaviaron de endanĝeritaj sturgospecioj

La kreskanta apetito je kaviaro endanĝerigas ĉiom pli la ekzistadon de kelkaj specioj de sturgoj (*Acipenser*edoj), inter ili la fama Rusa "belugosturgo" en la rivero Volgo. De 1991 plialtiĝis la importoj de kaviaro al Usono je 100%. Por ke seriozaj komercistoj kapablu rifuzi la liveron de tiu luksa nutraĵo el ovoj de endanĝeritaj fiŝspecioj, Usonaj sciencistoj postulis kaj evoluis ekzaktan devenokonfirmilon.

Helpe de speciopitaj genkarakterizaĵoj kun preciza hereda informo pri la fiŝoj, oni nun povas fideinde pruvi, el kiu sturgospecio devenas la kaviaro. Unua elprovo de la metodo en renomaj Novjorkaj nutraĵvendejoj pruvis falsajn deklarojn ĉe 5 el 23 kaviarspecimenoj. La sciencistoj raportas en la scienca ĵurnalo *Nature*, ke tri trovaĵoj estis alarmaj: la kaviaro devenis el sturgospecioj, kiuj troviĝas en la "ruĝa listo" pro minaco de tutpereco. La sciencistoj nun volas evolui teston, kiun povus uzi la komercistoj mem dum provkontroloj pri la deveno de kaviaro.

Angla kiel mondolingvo malriĉiĝas¹³

Necesas ŝirmi plurlingvecon

En la pasintaj jaroj la Angla fariĝis preskaŭ monda lingvo. Ĉu tio endanĝerigas la plurlingvecon? Apenaŭ. Ĉar la por internacia komunikado parolata Angla havas limigitan vortotrezoron kaj ne taŭgas kiel portanto de socia kaj kultura vivo. La Angla lingvo fariĝis internacia komunikilo por la natursciencoj. Mondvasta ekonomia interplektiĝo kaj la supereco de la Usona dolaro en monda komerco, kiel ankaŭ invento de komputilo kaj komunikadteĥniko, kaj sekve -kaj tute ne fine- la "*Internet*" vastigis tiun disvolviĝon. En multaj agadsferoj ne plu eblas, labori sen scio de la Angla lingvo. Tamen nenio indikas, ke la naciaj lingvoj estas perdintaj sian signifon. La plurlingveco ŝajnas esti sekurigita, almenaŭ en Eŭropo. En

1995, la Eŭropa Ministra Konsilaro dufoje klare esprimis sin favore al konservado de plurlingveco.

Al ĉiuj lingvoj apartenas iliaj socia kaj kultura historio kaj historia kulturo. En ĉiu etna lingvo esprimiĝas tradiciaj kolektivaj pensmanieroj kaj kvalitoj. Tial ekzemple preskaŭ ne eblas la senpera traduko de proverboj - kaj tio estas ĝuste tiuj proverboj, kiuj formas profundan kulturen heredaĵon kaj estas transperataj de generacio al generacio. Neniu mondskala uzata lingvo povas anstataŭi tian kulturen heredaĵon.

Avantaĝoj - Malavantaĝoj : S-ro Bernard QUEMADA, vicprezidanto de la Alta Konsilaro por la Franca Lingvo substrekas, ke unueca mondlingvo havas avantaĝojn sed samtempe havas ankaŭ malavantaĝojn. Estas vere, ke la Angla nuntempe estas uzata en preskaŭ ĉiuj sciencaj, teknikaj, financaj kaj ekonomiaj kampoj aŭ transakcioj. Sed ĉar la Angla ne estas la gepatra lingvo de ĉiuj kunuzantoj, la internacie parolata Angla -kiu ĝenerale servas kiel tiuspeca komunikilo- estas malriĉiĝinta lingvo kun limigita vortrezoro. Por intelektulaj postuloj ĝi apenaŭ sufiĉas. Tiu fakto faras ĝin konsiderinde maltaŭga kiel portanto de la socikultura vivo.

Kio okazis al la Latina lingvo? Kiel ekzemplo valoras mencii la historian pasintecon. Antaŭ 2000 jaroj en Eŭropo ekzistis unueca "*lingua franca*", nome la Latina. Kvankam ĝi kapablis, persiste konserviĝi eĉ ĝis nia jarcento kiel lingvo de klereco por scienculoj kaj por la kristana katolika eklezio, ĝin estis venkintaj, kiel "ĝenerala komunikada lingvo", la laŭ-regione relative rapidaj ŝanĝiĝoj de la lingvopreferoj. El la Latina lingvo disvolviĝis la Franca, la Itala, la Portugala, la Rumana kaj la Hispana. Kaj inter Francparolantoj -same kiel inter parolantoj de la Angla kaj de la Hispana ambaŭflanke de la Atlantika Oceano- interkompreniĝproblemoj ne plu estas io tute nekutima.

Fremdlingvaj kavaliroj friponoj : S-ro Quemada atentigis en publikigo de la Eŭropa Esplor-Konsorcio pri Informatiko kaj Matematiko (*ERCIM-news*, n-ro 26, p.9) ke la uzado de nur unu komunikadlingvo donas certan "komfortecon", sed tute ne kapablas kompensi la malriĉiĝadon de la lingva kvalito, de sciigebloj kaj la limigitecon de ties intelekta valoro. Fakte tiuj, kiuj asertas, ke ili perfekte regas iun fremdan lingvon, ĝenerale estas kulpaĵaj pri iuspeca "kavalirfriponeco". Ĉar la plej multaj homoj tute ne perceptas tian pretendecan troigon, jam estas pruvo de tia antaŭvidita lingva malriĉiĝo - laŭ Quemada.

Kontraŭrimedo pere de INTERNET : En tia disvolviĝo eĉ la "Angla komunikada lingvo" ne estas escepto. Ankaŭ en ĝi okazas lingvaj simpligoj, kiuj kaŝe sed tamen funde ĝin enpenetras. Tiumaniere la problemoj fine koncernos, timas QUEMADA, ankaŭ la interretan komunikadon. Tamen ĵus

Internet povas esti kontraŭrimedo al tia lingva evoluo. La Eŭropa Unio opinias konsilinda, ke ĉio, kio apartenas al la socia, spirita kaj kultura bazo akumulu en Interreto. Per tio, tiu kultura heredaĵo estus ĉiam kaj por ĉiam mondavaste aktuala kaj disponebla. Kaŭze de tio, eble la intereso pri aliaj Eŭropaj lingvoj ankaŭ en aliaj landoj estos stimolata.

*Vulpo amas metropolan vivoĝojon*¹⁴

Al la vulpo ŝajne plaĉas urbegaj ĝangaloj. Svislandaj urbanoj devas alkuti-miĝi al la novaj, sovaĝbestaj najbaroj.

La vulpo en postdoma korto ne plu estas raraĵo en Svisaj urboj. Ĉiam pli de la esence retenemaj ruĝfelaj vulpoj trovas ilian vojon en urbocentrojn kaj tie enloĝiĝas kiel en propra hejmo. Dum multaj homoj reagis entuziasme pri tio kaj traktas la enmigrintojn kvazaŭ hejmaj bestoj, aliaj ĉagrenas pri ilia odoraĉo kaj fosado. Sed la publikaj instancoj responsaj pri sano estas maltrankvilegaj pro la minaco, ke vulpoj povos kontagi homojn per infektaj malsanoj.

En trijara vulpoprojekto, Svisaj medioesploristoj volas pli detale konatiĝi kun la novaj setluloj. "Ni simple devas eltrovi, ĉu prudenta kunvivado sur urba tereno estas ebla" diris Fabio BONTADINO de la Zurika laborgrupo 'Urboekologio', ĉar repuŝi la vulpojn en kamparajn regionojn li konsideras tute iluzia. "Oni povas mortpafi ilin - sed ĉiam postsekvos novaj". Dum la pasintaj du jaroj oni malkovris en Zuriko cent vulpejojn, en kiuj la vulpoj plenkreskis siajn idojn. Triono de la vulpejoj troviĝis meze en la urbocentro, la aliaj en urboproksimaj arbejoj. En plej multaj Svislandaj urboj la tie loĝantaj vulpoj estas ĉasataj, ĉirkaŭ 45000 estas mortpafitaj dum la pasintaj du jaroj en la tuta lando. Malgraŭ tio, la vulpopopulacio kreskis inter kvar- kaj kvinoble en daŭro de la lastaj dek jaroj.

La vulpo estas eksterordinare adaptebla sovaĝbesto, diris BONTADINA. Ĝi povas travivi kaj en dezertaj kaj en alpmontaraj regionoj. Evidente ankaŭ dum intensiĝo de homa urbanizado ĝi kapablas enloĝiĝi kaj senti sin hejme en la urboĝangalo. Kiel ĉion manĝanta besto ĝi trovas konvenajn vivkondiĉojn en apuddomaj kortoj, ĉe rubujoj kaj en la proksimeco de kompoŝtejoj. La ebla malsanotransperado certe estas granda minaco: la plej grava problemo krom la rabio estas specifa vulpotenio, kiu kaŭzas elinokokan hepatomalsanon ĉe homoj. Kun la ekskremento, vulpoj eligas ovojn kun maturaj larvoj, pere de kiuj la homo povos infekti sin post konsumado de ĝardenaj legomoj kaj fruktoj malpurigitaj per tiaj infektigaj ovoj. En Svisujo ĉirkaŭ dek personoj po unu jaro infektigas. La menciita vulpoprojekto -laŭ informoj de Christian STAUFFER de la urba forstoficejo en Zuriko- konsistas el tri esencaj partoj. La sciencistoj volas esplori la kaŭzojn de la vulpa for-